

N. N. 32, Es ist ein Ros entsprungen	N. N. 32, Elkreskis rozbranĉeto	N. N. 32, Rozbranĉo forĝermadis	N. N. 32, Burĝonis rozarbedo
	<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Felix Ney</i>	<i>tradukita de Guido Holz</i>
1. Es ist ein Ros entsprungen aus einer Wurzel zart, wie uns die Alten sungen, von Jesse kam die Art und hat ein Blümlein bracht mitten im kalten Winter, wohl zu der halben Nacht.	1. Elkreskis rozbranĉeto el rozarbst' de Di'. Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis rozfloreto meze en vintra nokto laŭ diro de profet'.	Rozbranĉo forĝermadis el trunk' de nobelec'. Prauloj jam kantadis: de Jišaj ĝia spec'. Floretos portis ĝi, en akra vintro estis, Je horo de noktmez'.	1. Burĝonis rozarbedo el delikata sin' laŭ olda kantheredo, Jišaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintretempo je noktomeza hor'.
2. Das Röslein, das ich meine, davon Jesaia sagt, ist Maria die reine, die uns das Blümlein bracht. Aus Gottes ewgem Rat hat sie ein Kind geboren und blieb ein reine Magd.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' prognozis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgulin'. Laŭ dipotenza vol' si naskis Di-infanson por tutamond' kon-sol'.	La branĉo anoncita Jesaja de profet': Maria netuŝita, de kiu la floret'. Eterne volis Di': naskinta infaneton Plej pura restis ŝi.	2. El virgulin' beata, mirinda roz-arbed', elvenis flor' benata laŭ diro de profet'. Laŭ sankta Diordon' si naskis infaneton por nia sav' kaj bon'.
3. Das Blümelein so kleine, das duftet uns so süß, mit seinem hellen Scheine vertreibt's die Finsternis: Wahr' Mensch und wahrer Gott, hilft uns aus allem Leide, rettet von Sünd und Tod.	3. Kaj tiu belfloredo tre hele lumas ĝi. Obskuron la brileto forprenas nun de ni. Vi hom' kaj vera Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.	De tiu eta floro alvenas bonodor' Ĝi brilas en la koro, mallumon pelas for. Homido, Dia Vort', nin el sufero helpas, De pek' Savant' kaj mort'.	3. Kaj ĉi floredo belas, amindas per parfum'; la nokton ĝi forpelas per sia brila lum', nin helpas el mizer', el pek' kaj morto savas; Li, hom' kaj Di' en ver'.
...	...	...	...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.

Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)

Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro "Adoru", n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).